

## Lektion 10 / Leciono dek

1.

### Ute skribas leteron al sia amikino en Hispanujo

Kara Maria,  
kiel vi fartas?

Kore mi dankas al vi pro via lasta letero.  
La kalendaro atentigis min, ke morgaŭ

estos via naskiĝ-tago.  
Tial mi precipe volas hodiaŭ kore gratuli al vi.  
Espereble vi havos agrablan feston!

Mi tre bedaŭras, ke mi ne pli frue respondis,  
kaj petas vian pardonon. Sed lastatempe tro  
multaj taskoj okupis min.  
Lastan merkredon mi havis akcidenton:  
Aŭtostiranto ne vidis min, puŝis kontraŭ

mian biciklon kaj ĵetis min teren,

tiel ke mia dekstra brako rompiĝis.  
Mi perdis multe da sango kaj ploregis pro  
la ŝoko.  
Ambulanco venis kaj transportis min al

malsanulejo en la urbocentro,

kie oni prizorgis min.

Intertempe mi retranskviliĝis, sed mi  
ankoraŭ suferas pro doloroj en miaj brak-ostoj.

La tutan brakon kovras gipso, sed  
bonŝance mi estas maldekstra-manulo  
kaj tial senprobleme kapablas skribi al vi.  
Kiom kvieta ĉiutago, kiam oni havas

devige feriajn tagojn, rigardante tra la

fenestro!

Ekstere estas printempo,  
kaj la naturo vekigis.

La arboj ekhavas foliojn, la suno brilas,  
kaj la birdoj preparas nestojn.

kalendaro : Kalender  
morgaŭ : morgen  
naski : gebären; naskiĝ-tago : Geburtstag  
gratuli : gratulieren  
espereble : hoffentlich  
agrabla : angenehm  
festi : feiern

tasko : Aufgabe  
okupi : besetzen, in Anspruch nehmen  
akcidento : Unfall  
aŭto(mobilo) : Auto(mobil)  
stiri : steuern, lenken  
puŝi : stoßen  
ĵeti : werfen, schleudern  
teren : zu Boden  
brako : Arm  
perdi : verlieren  
plori : weinen  
ambulanco : Krankenwagen  
porti : tragen; transporti : transportieren  
sana : gesund; malsanulejo : Krankenhaus  
centro : Zentrum  
zorgi : sich kümmern; zorgo : (Für)Sorge  
prizorgi : versorgen  
trankvila : (innerlich) ruhig  
suferi : leiden  
osto : Knochen  
kovri : bedecken  
gipso : Gips  
kapabla : fähig, imstande  
kvieta : ruhig (ohne Lärm)  
ĉiutago : Alltag  
devigi : zwingen  
ferio : arbeitsfreier Tag  
fenestro : Fenster  
ekster : außerhalb  
naturo : Natur  
prepari : vorbereiten  
nesto : Nest

Kelkaj insektoj ĉirkaŭflugas la

unuajn florojn en la ĝardeno.

Ĉie io kreskas kaj rekvivas.

Nu, mi ne volas plendi.

Ne miskomprenu min:

Ĝenerale post ia akcidento oni devas esti kontenta, ne esti rompinta gambon aŭ

eĉ esti mortinta. -

Ho, tio certe ne estis gaja raporto de mi, pardonu!

Sed oni ĉiam sentas sin devigata,

komuniki tion, kio onin aktuale premas.

Ĝis baldaŭa reskribo, kun amikaj salutoj,  
Ute

## 2. Maria respondas al la letero de Ute (Kompletigu la frazojn)

Salut....., Ute!

Kiam via letero ven....., mi tre ĝoj.....,  
ĉar mi jam long.....atendis iu.... viv-indiko.....  
de vi. Legante vian leteron, mi tamen  
ektim.....is: kiaj.... novaĵo.....!

Leginte, ke vi intertempe jam iom  
rebonfart.....as, mi retrankvil.....is, sed mi  
bedaŭras vin pro vi..... dolor..... en  
via brak-ost..... .

Dankon pro via.... gratulo.... okaze de mia  
naskiĝ-tago. Mi havis tre agrabl.... festo....  
kun multaj amikoj.

Ni estis tre gaj....., kaj imagu: Kiam ni  
estis fest.....aj, venis la informo, ke  
mia pli aĝa frat.....o naskis infan.... .

Post tri knabo.... fine la atendita filino!  
Tio estis ĝojkri.....o!

Mi ŝercis: „Trifoje mi estis jam onklo,  
kaj nun, je la kvara fojo, fine onklino!“  
Vi scias ja, ke mi estas sufiĉe ŝerc.....a.

Sed mi revenu al via akcidento.... .

Ĉu en via urbo la aŭtostirantoj estas  
malalent.....aj? Ĉe ni bedaŭrinde jes.

Okazas plendinde multaj akcident.....,  
ĉar kelkaj aŭtistoj vere estas fiaj.

insekto : Insekt

flugi : fliegen

flori : blühen; floro : Blume; Blüte

ĝardeno : Garten

ĉie : überall

kreski : wachsen

plendi : klagen, sich beschweren

mis- : fehlgehend, miss-

ia : irgendwie beschaffen, irgendein

kontenta : zufrieden

-int- : <Partizip Präteritum Aktiv>

gambo : Bein

morti : sterben

gaja : fröhlich

senti : empfinden, fühlen

-at- : <Partizip Präsens Passiv>

premi : (be)drücken

okaze de : anlässlich

-it- : <Partizip Präteritum Passiv>

fi- : (moralisch) schlecht

Ĝis nun mi neni..... estis en malsanul.....o.  
Ĉu la kuracistoj bone zorgis por vi....?  
Ĉu tre dolor....., kiam ili surmetis la gipson  
ĉirkaŭ via.... brako.....?  
Iam iu fihundo malatente puŝis min, kaj  
mi..... rompis nur unu fingro.... .  
Ĝi eĉ ne sangis, tamen estis jam tro por mi,  
ĉar mi neniom eltenas.

neniom : nichts, in keiner Menge  
elteni : aushalten, ertragen

Kio okazis kun tiu aŭtisto, kiu kaŭzis vian  
akcidenton? Li dev.... pagi por ĉio, ĉu ne?  
Kaj ĉu via biciklo estas tute rompita?  
Ĉu indas, refunkci....i ĝin aŭ ĉu vi devas  
aĉeti novan?

aĉeti : kaufen

Ho, vi do estas maldekstra-man..... o!  
Ĉu vi en la lernejo, lern.....e skribi, havis  
problemo....? Ĉu viaj instruistoj premis vin,  
ŝanĝ..... la manon dum skribado?  
En nia socio estis long.... diskut....., ĉu tio  
ind....., aŭ ĉu oni pli bone toleru tion.  
Dum la tempo de miaj paĉjo kaj panjo  
oni ne facile toleris ion, oni estis ĝenerale  
ankoraŭ sufiĉe maltoler.....a.  
Ho, nun mi komenc.....as vere babili... –

toleri : tolerieren  
-ĉj- : <Koseform für Männer>; paĉjo : Papa

Ĉu maljam nun estas printempo.... ĉe vi?  
Nu, ĉe ni jam delonge! El tio oni vidas,  
ke mi hejmas en la sudo kaj vi en la  
nordo.

maljam : erst  
sudo : Süden  
nordo : Norden

Ĉi tie la floroj estas jam sufiĉe kreskintaj,  
ĉiuj birdonestoj jam pluraj.... semajnoj....  
prepar....aj. La suno brilas la tut..... tag.....,  
kaj ni ĝojas, ke la arboj estas kovr.....aj de  
folioj. Sub ili ne estas tiom varmeg....!

tiom : so viel; so überaus stark

Meze en tia vivo oni ne emas pensi pri  
la morto, sed akcidento kiel via povus ja  
okazi ĉiutage al ĉiu. Ĉu vi eble dum la  
somero ven..... ferii kun ni?

Tio est.... vere bon.....a!  
Mi esperas, ke vi baldaŭ est.... resaniĝinta!

Tre koraj.... saluto.... de via leter-amikino  
Maria

### 3. La participoj en Esperanto

Esperanto havas la voĉojn *aktivo* kaj *pasivo*, sed ilin oni renkontas nur en la 6 participoj.

voĉo : Stimme; (gramm.) Genus verbi  
aktivo : (gramm.) Aktiv  
pasiva : passiv; pasivo : (gramm.) Passiv

En Esperanto participoj estas nur „adjektivoj kun specialaj sufiksoj“, nome  
3 aktivaj: -ant-, -int-, -ont-  
3 pasivaj: -at-, -it-, -ot-

<Particip Präsens/Perfekt/Futur Aktiv>  
<Particip Präsens/Perfekt/Futur Passiv>

Se vi ne nepre bezonas participon, uzu laŭeble simple la verbformojn -as, -is kaj -os.

La substantivaj formoj ĉiam signifas homon (sen indiko de la sekso):  
mortinto ‚Gestorbener / Toter‘, lernanto ‚Lehrling‘, kaptito ‚Gefangener‘  
Esceptoj estas la participoj de est- :  
estanto ‚Gegenwart‘, estinto ‚Vergangenheit‘, estonto ‚Zukunft‘ (estonte ‚künftig‘)

Do, same kiel en la verbformoj kun -as / -is / -os, ankaŭ en la participoj -a- / -i- / -o- rilatas al la estanto / estinto / estonto. Tamen oni ne forgesu, ke participoj unuarange estas adjektivoj. Krome la aktivo indikas ĉefe agon, dum la pasivo ĉefe indikas staton. Tial en la aktivo la participoj kun -ant- estas pli oftaj ol tiuj kun -int-, dum en la pasivo estas inverse: formoj kun -it- estas multe pli oftaj ol iuj kun -at-.

Ĉe multaj verboj ne estas facile scii, ĉu -ata- aŭ -ita-formo estas pli bona. Tio estas la sekvo de la malklara signifo de la verbo, ne de maltaŭga gramatiko de Esperanto.

Ekzemploj:

3.1 Ĉu „okupi“ signifas agon aŭ staton?

„Mi okupas la seĝon.“ – Ĉu tio signifas, ke mi ĵus ekprenas la seĝon por sursidiĝi (= ago)? Aŭ, ke mi jam (delonge) sidas sur la seĝo okupante ĝin (= stato)?

Sekve estas klare, ke oni povas demandi:

„Pardonu, ĉu tiu ĉi seĝo estas libera aŭ ĉu ĝi estas okupita?“

3.2 „Kovri“ signifas, kaj agon, kaj staton.

Oni kovris mian brakon per gipso. =>

Mia brako estis kovrata per gipso.

Mian brakon kovras gipso. =>

Mia brako estas gipskovrita.

La lasta frazo nur indikas staton, ne plu agon. Ankaŭ en la aktiva frazo „kovras“ ne vere indikas agon, sed staton. Oni tial povus ankaŭ uzi la klarigon, ke „kovri“ havas du signifojn.

### 4. Kelkaj ekzercoj transformi frazojn el aktivo al la pasiva formo

La sekvantaj frazoj do ne estas ekzemplodone bonaj, sed ili montru la (teorian) uzon de participoj. Maldekstre staras senparticipa frazo. Laŭ ties signifo kompletigu la dekstran fraziformon per participo.

teorio : Theorie

4.01 Mi vere bonfartas. =>

Mi estas vere bone fart.....a.

4.02 La kalendaro atentigis min, ke ... =>

Mi estas atentig.....a de la kalendaro, ke ...

4.03 Mi kore gratulas al vi. =>

Vi estas kore gratul.....a de mi.

4.04 Mi ne respondis vian leteron. =>	Via letero ne estas respond.....a de mi.
4.05 Morgaŭ mi respondos vian leteron. =>	Via letero estas respond.....a de mi morgaŭ.
4.06 Tro multaj taskoj okupis min. =>	Mi estis okup.....a de tro multaj taskoj.
4.07 Aŭtostiranto ne vidis min. =>	Aŭtostiranto ne estis vid.....a min.
4.08 La aŭto puŝis mian biciklon. =>	La biciklo estis puŝ.....a de la aŭto.
4.09 La aŭto ĵetis min teren. =>	Mi estis terenĵet.....a de la aŭto.
4.10 Ambulanco transportis min al malsanulejo. =>	Mi estis transport.....a al malsanulejo.
4.11 Tie oni prizorgis min. =>	Tie mi estis prizorg.....a.
4.12 La birdoj ĵus preparas la nestojn. =>	La birdoj estas prepar.....aj la nestojn.
4.13 Insektoj ĉirkaŭflugas la florojn. =>	La floroj estas ĉirkaŭflug.....aj de insektoj.
4.14 Ne miskomprenu min. =>	Mi ne estu miskompren.....a (de vi).
4.15 Ofte zorgoj onin aktuale premas. =>	Ofte oni aktuale estas prem.....a de zorgoj.

Pripensu:

Kiujn el la supraj frazoj oni pli bone konstruu en la aktiva formo?

En kiuj dekstraj frazoj, kaj la -ata-, kaj la -ita-formo de la pasiva participo estas klarigeblaj?

Sekve lernu: La uzo de la participoj ne estas simpla. Multaj homoj ankaŭ diskutadas jam de longe, ĉu supre tiu dekstra frazo devas teksti „La biciklo estis puŝata de la aŭto“ (ĉar samtempe okazanta kun la paroltempo) aŭ „La biciklo estis puŝita de la aŭto“ (ĉar la puŝo daŭris nur momenton kaj okazis ĝisfine). Oni nomas tiujn du gramatikajn starpunktojn „tempismo“ kaj „aspektismo“.

## 5. Scivolema demandado

Via amik(in)o biciklante en la urbo havis akcidenton kun aŭto. Vi estas scivolema kaj demandas lin (ŝin) pri detaloj: (Elpensu ankaŭ mem pliajn demandojn)

scivolema : neugierig

detala : im einzelnen, detailliert

- 5.01 Kiam okazis la akcidento?
- 5.02 Ĉu vi estis piediranta aŭ biciklanta?
- 5.03 Kien vi volis bicikli?
- 5.04 De kie venis la aŭto?
- 5.05 De kie venis vi?
- 5.06 Kial la aŭtisto ne vidis vin?
- 5.07 Kion vi sentis, kiam la aŭto trafis vian biciklon?
- 5.08 Ĉu vi forte falis?
- 5.09 Ĉu via brako aŭ via gambo rompiĝis?
- 5.10 Ĉu elfluis multe da sango?
- 5.11 Kiel vi reagis?
- 5.12 Kion diris la aŭtostirinto?
- 5.13 Kiom da pasantoj venis por helpi vin?
- 5.14 Ĉu iu telefonis al la ambulanco?
- 5.15 Kiom longe daŭris, ĝis (kiam) venis la ambulanco?
- 5.16 Kiom longe vi kuŝis sur la strato?
- 5.17 Kion vi pensis kuŝante tie?
- 5.18 Kion vi diris al la helpantoj?
- 5.19 Ĉu vi havis dolorojn, kiam oni transportis vin?
- 5.20 Kiom longe daŭris, ĝis (kiam) vi atingis la malsanulejon?
- 5.21 Kiom da kuracistoj venis por helpi vin?

5.23 Kion ili diris?

5.24 Ĉu iu informis viajn gepatrojn?

5.25 Ĉu mi demandas tro multe?

## 6. Ŝercoj

**Patrino** (al sia filo): Ho, jen vi ja reestas de via stir-ekzameno. Ĉu vi sukcesis?

**Filo:** Hm, ni ne scias, panjo.

**Patrino:** Kial vi ne scias tion? Kion diris la stirekzamenisto?

**Filo:** Al mi nenion. Li ankoraŭ ne estis revekiĝinta, kiam la ambulanco forveturigis lin.

**Raportisto** (demandante maljunan viron):

Ĉu vi povas malkaŝi al niaj aŭskultantoj, kiel vi sukcesis iĝi tiom maljuna?

**La maljunulo:** Nu, mi ĉiam vivis ekzemplodone:

mi ĉiam sufiĉe frue enlitigis, neniam tro multe manĝis, neniam trinkis alkoholon kaj ankaŭ neniam havis am-aferon kun virino...

Kaj vidu: morgaŭ mi festos mian centjariĝon!

**Raportisto:** Interese! - Sed kiel ...?

## 7. La Universalaj Kongresoj

Vi jam scias, ke la unua Universala Kongreso okazis en la jaro 1905 en Boulogne-sur-Mer. Interrompita nur per la du mondaj militoj ekde tiam ĉiu-jare okazadas UKoj ie en la mondo.

gesprochen: U-Ko-oj

Demandu ĉeestanton, kiu iam vizitis UKon, pri detaloj.

Se neniu jam partoprenis en UK, demandu pri alia Esperanto-aranĝo aŭ simple fantaziu.

fantazio : Fantasie

Kie kaj kiam okazos la venonta UK?  
Esploru tion en la Interreto.

esplori : erforschen



Vortoj por la kontinentoj:

Eŭropo : Europa

Ameriko : Amerika

Afriko : Afrika

Azio : Asien

Aŭstralio : Australien

Eŭropano : Europäer

Indiano : Indianer

Klarigu la apudan ŝercon. Ĉu vi povas diri, kie okazis la kvar Ukoj, pri kiuj la sinjorino parolas?

## 8. Ret-poŝto: Leteroj en la Interreto

poŝto : Post (Institution)

### 8.1 Kiel skribi kaj respondi ret-leteron

En la Interreto ekzistas ankaŭ eblo, interŝanĝi leterojn kaj mesaĝojn. Tion oni nomas „ret-poŝto“ en Esperantujo.

mesaĝo : Mitteilung

Ĉiutage oni povas kontroli en sia retpoŝta kesto, ĉu alvenis novaj komunikaĵoj. La retroprogramo prezentas la liston kun la envenintaj novaj mesaĝoj.

kesto : Kasten, Kiste

listo : Liste

Post alklako de la montro-butono

klaki : klicken, klacken

butono : Knopf

la retpoŝta programo malfermas la leteron, kaj oni povas legi la tekston.

Eble la sendinto aldonis krome aldonajon en la apendico.

aldon(aĵ)o : Zugabe

apendico : Anhang

Por via respondo klaku al la respond-butono. Vi povas decidi, ĉu vi volas prilabori kopion de la origina mesaĝo

decidi : entscheiden, beschließen

kopii : kopieren

origino : Ursprung

aŭ verki tute novan.

Fine vi per klako al la sendo-butono forsendas vian respondon.

Via amik(in)o ne havas imagon, kiel funkcias la ret-poŝto. Ĉu tio estas malfacila? Kion oni devas fari? Klarigu tion al via amik(in)o, kaj ŝi demandu pri detaloj. (Estas pli facile, se vi sidas aktuale antaŭ komputilo, kompreneble.)

### 8.2 Kion fari, se la specialaj literoj mankas:

#### La h-metodo kaj la x-metodo

x : legu „ikso“; ikso : Name des Nicht-Esperanto-Buchstabens „x“

Se vi ne povas vidi aŭ skribi la specialajn „ĉapelitajn“ Esperanto-literojn,

ĉapelo : Hut;

ĉapelita : mit einem Hut versehen

uzu alternativan skrib-manieron,

alternativo : Alternative

kiun jam rekomendis Zamenhof:

maniero : Art, Weise

rekomendi : empfehlen

Skribu anstataŭ la „ĉapelo“ postan literon „h“, anstataŭ „ŭ“ simple „u“.

Se tiam foje „u“ post „a“ aŭ „e“ ne egalas al „ŭ“, disigu la vokalojn per streketo:

egala : gleich, übereinstimmend

vokalo : Vokal

streki : einen Strich machen

pra-ulo, ne-utila, ktp.

Ankaŭ se povus ekiĝi malcerteco dum legado, ekzemple legante vortojn kiel „longhara“, estas rekomendinde, skribi „long-hara“, do uzi streketon. Oni nomas tiun alternativan skrib-manieron la „h-metodo“.

Pli nova, t.n. x-metodo estas, uzi anstataŭ „h“ la literon „x“ (ankaŭ por „ŭ“, do skribante „ux“).  
Nome, ĉar „x“ ne ekzistas en la Esperanta alfabeto, tiu skribmaniero estas pli okul-frapa, kaj ĝi taŭgas por aŭtomate

(t.e. per komputa programo) transformi tekston.

t.n. = tiel nomata : so genannt

alfabeto : Alphabet

frapi : klopfen

okulfrapa : auffallend, augenfällig

aŭtomato : Automat, Mechanismus

t.e. = tio estas : das heißt

(vor folgender Erläuterung)

## 9. Alparoloj kaj subskriboj en leteroj

Kiel oni formulas alparolojn kaj subskribojn en leteroj kaj ret-poŝtaĵoj?

### 9.1 (tre ĝentile kaj formale)

Firmao, nekonatoj:

Tre estimataj gesinjoroj!

Konatoj:

Tre estimataj gesinjoroj N.!

....

Kun alte estimantaj salutoj ...

Kun alt-estimaj salutoj ...

Alt-estime ...

### 9.2 (ĝentile kaj formale)

Estimata sinjor(in)o N.!

....

Kun afablaj salutoj ...

### 9.3 (ĝentile, inter Esperantistoj)

Estimata samideano / samideanino!

....

Kun samideanaj salutoj ...

### 9.4 (afable kaj formale, inter konatoj)

Kara sinjoro N.!

Kara {persona nomo}!

...

Kun multaj salutoj ...

Kun koraj salutoj ...

### 9.5 (malformale, inter konatoj)

Saluton, {persona nomo}!

....

Ĝis (reskribo), ...

alparolo : Anrede

subskribo : Unterschrift

formulo : Formel; formuli : formulieren

formala : formal; formell

firma/o : Firma

konato <m/f> : Bekannter

estimi : wertschätzen; schätzen

ideo : Idee; samideano = Esperantisto [Anhänger der gleichen Idee, Gesinnungsfreund]

9.6 (tre kore, inter bonaj amikoj aŭ proksimaj parencoj)

Kara {antaŭnomo}!

....

Kun amikaj salutoj, (via) ...

Atentu: Se vi scias la nomon, uzu la nomon en la alparolo por esti ĝentila.

Skribu nun leteron al via ĉefo en la firmao, en kiu vi laboras.

Rakontu, ke vi havis akcidenton kaj tial ne povis veni al la laborejo. ktp.

## 10. Pliaj afiksoj -ism-, -aĉ-, -id- kaj -end-

### 10.1 -ism-

10.1.1 Ĉiu ismo povas produkti fanatikulojn.

-ism- : Lehre, Weltanschauung

fanatika : fanatisch

10.1.2 Konataj ismoj estas la kapitalismo,

kapitalo : Kapital

la Kristanismo,

Kristo : Christus; Kristano: Christ

la socialismo,

sociala : sozial

la pacifismo.

pacifismo : Pazifismus

En la vorto „pacifismo“ -ism- estas nur pseŭdoafikso, ĉar „pacif-“ ne ekzistas.

pseŭdo- : pseudo-

Sed ekzistas la vorto „pacifisto“.

pacifisto : Pazifist

En tiu vorto ankaŭ -ist- estas

pseŭdoafikso.

Tiuj ekzemploj montras, ke ankaŭ en Esperanto la vortfarado ne estas tute skema.

skemo : Schema

### 10.2 -aĉ-

„aĉa“ signifas „malbona laŭ ekstera kvalito“,

-aĉ- : äußerlich minderwertig, schlecht

kontraŭe al „fi-“,

kvalito : Qualität, Beschaffenheit

kiu indikas internan, moralan malbonecon.

kontraŭe al : im Gegensatz zu

interna : innerlich

moralo : Moral

Do, oni diras ekzemple „domaĉo“,

„hundaĉo“, „muzikaĉo“, ktp.

Diferencigu:

aĉulo, homaĉo : malbela homo

fiulo, fihomo : morale malbona homo

### 10.3 -id-

„Ido“ signifas „poste-ulo“ de homo aŭ besto,

-id- <m/f> = poste-ulo : Nachkomme

do fil(in)o, nep(in)o kaj ĉiu pra-fil(in)o.

10.3.1 Bestoj kutime bone zorgas por sia idaro.

10.3.2 Reĝido estas fil(in)o aŭ nep(in)o de reĝo.

## 10.4 -end-

„-end-“ signifas, ke io devas esti farata.

-end- : unbedingt durchzuführen

10.4.1 Ĉiumatene en la laborejo mi unue  
notas liston kun la farendaĵoj de la tago.

not/i : notieren

10.4.2 Tiu afero vere estas kritikenda.

Bone diferencigu:

Leginda libro: libro, kiu valoras esti legata

valori : wert sein

Legenda libro: libro, kiu devas esti legata

Legota libro: libro, kiun oni legos

## 11. Liberaj dialogoj

### 11.1 Kiun metodon vi uzas?

Zwei Bekannte (A und B) treffen sich, begrüßen sich, fragen, wie's geht usw.

A erzählt: Da seine technische Umgebung veraltet ist und sein Computer deshalb die Zeichen nicht darstellen kann, verwendet er bei der Netzpost die h-Methode.

B ist erstaunt und lässt sich die h-Methode erklären.

Dann sagt B, dass er nur die x-Methode kennt und beschreibt sie.

A ist nun seinerseits erstaunt, argumentiert aber, dass x kein Esperanto-Buchstabe ist.

B meint, gerade das sei nützlich, da dann die Sonderzeichen besser zu erkennen sind.

A hält dagegen, dass die x-Methode aber keine „offiziell“ von der Akademie anerkannte Methode ist.

Das ist B egal, er findet sie praktischer, weil man dann nicht aufpassen muss, ob man nicht manchmal Bindestriche setzen muss, um keine Missverständnisse zu erzeugen.

Sicher, räumt A ein, das sei theoretisch und praktisch besser als bei der h-Methode. Aber da er sich an sie gewöhnt hat, will er dabei bleiben.

Klar, sagt B friedlich, jeder könne das ja machen, wie er will.

Freundliche Verabschiedung.

### 11.2 Kiun sezono vi ŝatas plej?

A, B, C und D sind jeweils der Meinung, dass der Frühling, der Sommer, der Herbst bzw. der Winter die schönste Jahreszeit ist. Jeder beschreibt der Reihe eine typische Szene seiner Jahreszeit. In der nächsten Runde bringt jeder dann einige Argumente vor, warum er „seine“ Jahreszeit für die schönste hält; die andern argumentieren dagegen (ohne die Vorzüge „ihrer“ Jahreszeit zu nennen. Das machen sie ja, wenn sie an der Reihe sind.)

## 12. Dialogoj

Versuchen Sie nicht, wörtlich zu übersetzen, sondern die deutschen Vorgaben völlig neu in Esperanto auszudrücken. Übersetzen ist schwieriger als selbst formulieren!

### 12.1 Dialogo unua

- Hallo, {Peter}! Dich habe ich ja eine Ewigkeit nicht gesehen.

- Hallo, {Susanne}, ja, das ist wahr. Ich war nämlich 4 Wochen im Krankenhaus.

- Was? Was ist denn passiert?

- Ich hatte einen Autounfall auf der Hauptstraße im Stadtzentrum.
- Mach keine Sachen. Wie ist das denn gekommen?
  - Na, du weißt doch, an der Hauptstraße steht eine Reihe von Bäumen, und gegen einen von ihnen bin ich gefahren.
- Das gibt's doch nicht. Du fährst doch nicht einfach grundlos gegen einen Baum. Da muss doch noch etwas geschehen sein.
  - Natürlich. Ein Kind kam mit dem Fahrrad aus einer Seitenstraße gefahren und passte nicht auf.
- Ich verstehe. Da wolltest du selbstverständlich nicht das Kind umfahren, hast das Steuer herumgerissen und statt des Kindes den Baum getroffen.
  - Genauso war's. Ich habe mir dabei meinen linken Arm gebrochen und außerdem eine Platzwunde am Kopf zugezogen.
- Oh, das ist kein Spaß. Die Eltern des Kindes waren dir sicher sehr dankbar, nicht wahr?
  - Ja, sie haben mich im Krankenhaus mit Blumen besucht, und als das Kind mich da so liegen sah, hat es sogar geweint.
- Wie rührend (= „herzberührend“)! Das passt sicher ab jetzt auf der Straße besser auf.
  - Nun ja, bei Kindern muss man eben mit allem rechnen.
- Na, Hauptsache, du bist wieder auf den Beinen. Oh, ich sehe, dass ich mich beeilen muss, um noch alles zu bekommen, was ich einkaufen will.
  - Ja, mir geht's genauso. Also, tschüss, {Susanne}, bis bald!
- Ja, {Peter}, mach's gut, tschüss.

## 12.2 Dialogo dua (telefona)

- {Peter Majer}
  - Hallo, {Peter}, ich bin's, {Susanne}. Weißt du, ob sich unsere Esperanto-Gruppe nächste Woche trifft?
- Hm, da muss ich mal überlegen. Hat {Rolf} nicht gesagt, dass nichts wäre?
  - Nein, das bezog sich auf übernächste Woche. Ich habe im Gegenteil unklar in Erinnerung, dass irgendwas Besonderes stattfinden soll.
- Ach ja, jetzt erinnere ich mich. Wir bekommen Besuch aus Afrika. Ein Esperanto-Freund aus Burundi reist in Deutschland herum und besucht alle Gruppen.
  - Richtig, jetzt erinnere ich mich auch. Er will einen Vortrag über sein Land halten.
- Den will ich auf jeden Fall hören, das wird bestimmt sehr interessant.
  - Das meine ich auch. Bei wem kommt er eigentlich unter?
- Bei {Rolf} selbst. Der hat ja ein großes Haus mit einem Gästezimmer.
  - Wie ist dieser Kontakt überhaupt zustande gekommen?
- Ganz einfach. {Rolf} steht doch mit seiner Adresse in der Pasporta-Servo-Broschüre, sogar mit Netzpostadresse. Da hat ihn der afrikanische Esperanto-Freund einfach übers Netz angeschrieben.
  - Eigentlich eine gute Idee, dieser Pasporta Servo. Ich glaube, ich werde mich für das Adressenverzeichnis im kommenden Jahr auch anmelden.
- Ich kann das leider nicht, denn ich wohne ja bei meinen Eltern, und die wären nicht allzu glücklich, wenn ich dauernd Besuch bekäme, den sie nicht verstünden.
  - Da gibt's es doch nur eines: Sie müssen einfach auch Esperanto lernen.
- Das habe ich ihnen auch schon einige Male gesagt. Aber sie hören nicht auf mich.
  - Haben sie denn was gegen Esperanto?
- Das nicht. Sie waren durchaus dafür, dass ich es lernte. Sie sind einfach zu beschäftigt.
  - Na gut, man soll niemanden zwingen. - Dann also bis nächste Woche.

- Ja, bis nächste Woche, auf Wiederhören.